



Oficiala Organo
de

Flandra
Ligo
Esperantista



JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belgoj

Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpage.

Flandra Esperanto - Instituto

Vereniging zonder Winstbejag
Magdalenastraat, 29, KORTRIJK
Poŝtekkonto: F. E. I. 3268.51

EL LA PREZARO:

La Viro el Francujo — Ivans	Fr. 32,—	bind.
Per balono al la poluso — Andrée	70,—	»
Leono de Flandrujo — Conscience	55,—	»
Pallieter — Timmermans	43,—	»
Pallieter — Timmermans	33,—	broŝ.
La Esperanto-Klubo — Malmgren	6,50	»
Hurah! — Baghy	40,—	»
Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	7,50	»
Amo kaj Poezio — van Schoor	10,—	»
La du Amatinoj — de Musset	7,50	»
La Infanoj de Betlehem — S. Lagerlöf	5,—	»
La Junulino ei Stormyr — Selma Lagerlöf	12,—	»
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf	12,—	»
Gosta Berling — Selma Lagerlöf	39,—	»
La Sorĉistino el Kastilio — S. Asch	24,—	»
Verdaj Donkiŝotoj — J. Baghy	14,—	»
Dialogoj en Esperanto — E. Dahl	3,75	»
Dialogoj kaj Komeditoj — E. Dahl	3,75	»
Barbro kaj Eriko — Letera romaneto	3,50	»
La Stranga Butiko — R. Schwartz	17,—	»
Anni kaj Montmartre — R. Schwartz	17,—	»
Gaja Lernolibro (ilustrita)	12,—	»
Plena Vortaro de Esperanto	75,—	»
Tra la Labirinto de la E. gramatiko (volmakingskursus)	36,—	»
Woordenboekje Blok (1890 stamwoorden)	2,—	»
Leerboek Dirksen, 2 deelen	12,50	»
Konversacia Literaturo (ilustr. broŝuroj)	10,—	»
Het Esperanto in 10 lessen — Witteryck	5,—	»
Literatura Mondo (monata revuo) Jarabono	62,50	»
Groot Woordenboek Van Straaten	70,—	»
Schidlof Zakwoordenboek	22,50	»
Flandra Esper. 2-a, 3-a, 4-a kaj 5-a jarkolektoj (kompl.)	15,—	»
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n° 1)	10,—	»
Flageto por biciklo	6,—	»
Fotografajo D-ro Zamenhof, bela poŝtkarto	1,50	»

INSIGNOJ: Malgranda verda stelo: 1,75 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 2,25 fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 3,50 fr.

Glumarkoj, en lingvo Flandra aŭ Esperanta: folio de 8 diversaj markoj kostas po 5,— fr. por 10 folioj.

Glumarkoj « Vredesaktie » po 3 fr. por 100.

Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1,— fr.


Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3,— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1 fr.

La prezoj ne entenas afrankon.

Flandra Esperantisto

Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista
Aperas ĉiumonate



Redaktoro :
(tempe funkcia)ta
A. Lodema
Houwerstraat, 22
Antwerpen.
Tel. : 277.51.



Administranto :
Gerard Debrouwere
Magdalenastr. 29
Kortrijk

Jara abonprezo : 20 frankoj.—Eksterlando : 5 belgoj
Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpage.
Poŝtĉeko : 2321.50 de F. L. E. Kortrijk.


Brussel vin invitas !

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA HAVAS LA HONORON, INVITI
CIUJN FLANDRAJN KAJ EKSTERLANDAJN ESPERANTISTOJN, AL LA 6-a
FLANDRA KONGRESO DE ESPERANTO, KIU OKAZOS LA 8-an, 9-an KAJ
10-an de JUNIO 1935, EN BRUSSEL.

LA ORGANIZA KOMITATO ZORGOS POR INDA PROGRAMO KUN
UNIKAJ ARANĜOJ, NI ZORGU POR INDA NOMBRO DE PARTOPRE-
NANTOJ!

LA LIGESTRARO.

MONDEKSPOZICIO, BRUSSEL 1935.



CENTRA HALO DE LA GRANDAJ PALACOJ

Arkitekto : J. Van Neck.

Brussel, la urbo de nia 6-a

Brussel, landa ĉefurbo, kun ĝiaj antaŭurboj, nombras proksimume unu milionon da enloĝantoj.

Kun ĝiaj larĝaj bulvaroj, luksaj hoteloj kaj movoplenaj stratoj, ĝi vere impresas kiel grandurbo. Vespere kaj nokte, banante en la helo de centoj da lumreklamoj, fremda vizitanto facile sin imagus en malgranda Parizo. Nur la grandaj bulvaroj, la okulfrapaj reklamtabuloj kaj la francaj surskriboj sur la luksaj montrofenestroj de la magazenoj — ĉiuj supraĵaj vivosignoj — rememoras pri franca urbo. Tamen en ili ne kuŝas la Brusela animo, kiun oni nur trovos vizitante la grandan placon.

La Bruselano prave fieras pri tiu unika placo, kiu atestas pri grandioza pasinteco. Vere unika ĝi estas, kun ĝiaj antikvaj gildodomoj, rememorante pri pasinta gloro kaj fruakiritaj rajtoj de liberama popolo. La urbodomo, kun gracila turo, vera ĝuo por la okuloj, elradias meditigan atmosferon pri heroa epoko. Kaj, dum festotagoj, kiam la kolorriĉaj flagoj de la estintaj gildoj ornamas la fasadojn kaj pli akcentigas la mezepokan grandiozecon de tiu unika placo, oni volonte konfesas ke ekvivalento, posedanta sur tia malgranda surfaco tiom da historiaj belaĵoj, certe ne estas trovebla.



LA URBODOMO

Kaj sur tiu placo, en la ombro de tiuj antikvaj konstruaĵoj, vivas la Brusela popolo, kiu restis flandra laŭ animo, malgraŭ centjaro de francema administrado.

* * *

Dum la pratempo, la regiono kiu nun nomiĝas Brabanto, estis sinsekve kovrita de malkvieta maro, vastaj marĉoj kaj densa arbaro. Per arkeologiaj trovoj, faritaj en Schaarbeek, S.-Gillis, Laeken kaj aliaj antaŭurboj de Brussel, oni eksciis pri la vivo de prahistoriaj homoj kaj bestoj en la ĉirkaŭaĵo.

La unuaj organizitaj triboj, kiuj loĝis sur tiuj marĉaj grundoj, posedis certan — kvankam tre primitivan — civilizon. Ili apartenis al la gento de la « Nerviers » kies teritorio etendiĝis ĝis Bavay (Bavacum), Kamerijk (Cameracum) kaj Oudenaarde. Ili vivis libere kaj sendepende ĝis la veno de la Romanoj kies superrego — kiu daŭris 400 jarojn — kostis al ili la liberecon sed, kompanse, alportis pli altnivelan civilizacion.

Dum la 4-a jarcento, post la romana dekadenco, la Frankoj, venantaj el Germanujo, anstataŭis la Romanojn. Ili plifortigis la ĝermanan karakteron de la loĝantaro — precipe koncerne la lingvo — suferanta dum jarcentoj pro latinigado, kiu sude jam tiel forte enradikiĝis, ke ĝi montriĝis ne ekstermebla. Ankoraŭ nuntempe oni parolas, en la suda parto de la provinco Brabanto, francan dialekton. Tiu lingvolimo, sude de kiu troviĝas la latinidaj kaj norde la ĝermanaj popoloj, kuŝas proksimume 15 kilometrojn sude de Brussel.

Je la fino de la 9-a jarcento Gaugericus, episkopo de Kamerijk, konstruigis sur insulo formita de la rivero Zenne, malgrandan kapelon. Ĉirkaŭ tiu kapelo baldaŭ grupiĝis kelkaj dometoj kiuj formis la originan kernon de la naskiĝinta urbo.

Iom poste Brussel posedis Castrum (fortikaĵo) kaj, troviĝante sur la granda vojo, kiu kondukis de Kolonjo al Gento, ĝi baldaŭ iĝis Emporium (grendeponejo, posedanta sufiĉe gravajn staplojn).

Je tiu tempo oni skribis Bruocsella, kio en la jaro 1134 iĝis Brucsella kaj en 1828 Brussel. Laŭ la topografio la nomo Brussel devenas de Broeksele, t. e. loĝejo apud la marĉo (Broek).

Dum la sekvantaj jarcentoj la urbo prosperis kaj aperis la unuaj gildoj (profesiaj unuiĝoj). Balderik, grafo de Loveno kaj Brussel, en la jaro 1047, konstruigis sur la Molenberg (altaĵo) preĝejon dediĉatan al Sankta Miĥaelo kaj Gudulo. Tiu preĝejo, post pluraj rekonstruoj kaj daŭraj plibeligoj, estis definitive renovigata en 1839 kaj iĝis la impona konstruaĵo kiun, nuntempe, oni povas kompari kun la plej famaj katedraloj.

En la urba kvartalo, kie loĝis la teksistoj oni ankaŭ konstruis preĝejon (Kapellekerk) kaj, kelkajn jarojn poste, Brussel posedis sian belfridon (la turo de la sankta Nikolao-preĝejo; tiu turo nun ne plu ekzistas).

Sub la regado de Henriko la unua, duko de Brabanto, la urbo ĝuis grandan bonstaton. La gildoj iĝis veraj potencoj kaj konstruigis siajn famajn gildodomojn. Precipe la drapteksado prosperis kaj la Brusela drapo konkeris enviindan famon; ĝi estis ĉefe vendata en Francujo. Tiu prospero ĉiam iris kreskante kaj atingis sian



LA GRANDA ARKADO DE LA JUBILEA PARKO

plej altan nivelon je la fino de la regado de duko Johano la dua, kiu donacis al la urbo multajn gravajn privilegiojn.

En la komenco de la 14-a jarcento, la flandra nobelaro enviis la popolon pro la akiritaj rajtoj kaj provis, per sangaj bataloj kaj helpite de la franca reĝo, denove sklavigi la amason. Tiuj bataloj, kiuj ĉefe furiozis en la graflando Flandrujo, tamen havis rebaton en Brabanto. Kaj komencis dekadenca epoko por Brussel.

La duklando sinsekve staris sub franca kaj aŭstra superregado. Sub imperiestro Karlo (Keizer Karel) Brussel iĝis la restadejo de la plej potenca regnestro de Eŭropo kaj la ĉefurbo de la Nederlandoj. Tiutempe, 1525, la urbo jam nombris 65.000 enloĝantojn kaj posedis, krom universitaton, dek-tri flandrajn, ses valonajn kaj ses latinajn lernejojn.

Post efemera prospero la lando suferis hispanan superregadon kaj travivis malkvietan epokon. Sinksekve la duklando, kun Brussel kiel ĉefurbo, staris sub la regado de pluraj fremdaj regnoj. De tiuj jugoj la popolo plurfoje provis sin liberigi kaj, sub la heroa gvido de la graŭoj Hoorn kaj van Egmont kaj, poste, de la gilda dekano Anneessens, la loĝantaro brave kontraŭstaris al la fremdaj subpremantoj.

En la jaro 1695, la franca marŝalo de Villeroy per potenca armeo atakis la urbon kaj bombardis ĝin dum 48 horoj, tiel ke, de la bela urbo, postrestis nur rubaĵoj. La granda placo kun ĝia urbo-domo tute estis detruita. La hodiaŭaj konstruaĵoj de tiu placo da-

tumas do deponi tiu katastrofo. Ili tamen, antaŭ 50 jaroj, estis komplete renovigataj.

Nuntempe la ĉefurbo posedas multajn vidindajn monumentojn, muzeojn, observatorion kaj aliajn admirindajn konstruaĵojn. Ĝia situo grave kaj favore influas la signifon de la urbo kiu iĝis unu el la ĉefaj centroj de Eŭropo.


E. CORTVRIENDT.

Komunikoj de la Brusela Kongreskomitato

Kun jena numero de F. E. ni dissendas la aliĝilojn por la kongreso. La legantoj certe rimarkis ke ni iom malfrue aperigas ilin, kompare al la antaŭaj jaroj. Se tio okazis, estas ĉar ni renkontis gravajn malfacilaĵojn kiujn, feliĉe, ni sukcesis forigi.

Ni spertis ke la hotelestroj estas iom multepostulemaj. Verdire Pentekosto estos periodo dum kiu al ili ne mankos gastojn; krom tio, la Brusela Mondekspozicio allogos multajn vizitantojn. Fine ni tamen sukcesis akiri tre favorajn kondiĉojn, de estroj de pluraj tre komfortaj hoteloj.

Malgraŭ nia firma intenco, fiksi la prezojn de la kongresaranĝoj plej eble malmultekoste, ni estas devigataj iom plialtigi la prezojn de la loĝado. Ni esperas ke, konsiderante la eksterordinaran situacion en kiu la organiza komitato tiurilate troviĝas, tiu malgravaĵo ne malhelpos multnombrian ĉeston al nia 6-a. Des pli ĉar ni garantias komfortan loĝadon al ĉiu, kondiĉe ke la pago por loĝado estos farita minimume unu monato antaŭe. Ni tre rekomendas al partoprenantoj kiuj deziras dormi multnombro (minimume kvarope) en sama ĉambro, rilati plej baldaŭ kun la organiza komitato; ili ĝuos favorokondiĉojn.



GRUPO EL LA OMMEGANG (FOLKLORA IRANTARO)

Ĉar la horoj de la diversaj aranĝoj ne ankoraŭ estas definitive fiksitaj, ni, en la nuna numero, ne publikigas la kompletan programon. La plej gravajn aranĝojn ni tamen jam fiksas jene: Sabato: interkonatiĝo en la akceptejo, gaja vespero, dancado. Dimanĉo: diservo, oficiala akcepto, fotografado, festeno, festo, dancado. Lundo: vizito al la mondekspozicio. En la venonta numero de F. E. ni publikigas la detalan programon kiun ni nun zorgas ellaboras.

La kongresaj propagandmarkoj ne plu estas haveblaj; ili tute elvendiĝis.

Ni finas rememorigante ke la kongreskotizo plialtiĝos ĝis 12 fr. post Pasko. La aliĝontoj do rapidu. Ni denove kaj insiste avertas: pagu tuj por la hoteloj kaj minimume unu monato antaŭe, post tiu dato ni ne plu garantias loĝadon!

Interplenigu nun vian aliĝilon kaj resendu ĝin plej baldaŭ al la organiza komitato!

La L. K. K.

La legendo de Manneken-Pis

Unu el la ĉefaj folkloraj vidindaĵoj en Brussel, estas la fame konata Manneken-Pis.

Sur angulo de mallarĝa strateto, en plej malnova kvartalo de la urbo, proksime de la granda placo, troviĝas antikva fontaneto kiu elŝprucas sian akvon laŭ nekutima maniero. Anstataŭ la klasika Neptuna kapo kiu, inter duonmalfermitaj lipoj, ŝpareme ellasas la kutiman flufadenon, aŭ monstra hidrokapo, elkraĉante kun naŭza grimaco fluidaĵon, kiun oni imagas stomakbroganta, la antikva fontaneto konsistas el soklo, portanta bronzan etulon, kiu, tute nude kaj senĝene, urinas en la malsupre troviĝantan akvobasenon.

Sur sia soklo la bukharo, dikventra Manneken-Pis (Esp-e: urinanta etulo) la dekstra mano ripozanta sur la kokso kaj la maldekstra je la konvena loko, ŝajnas rigardi kun tia senkulpa mieno ĉiun preterpasanton, ke neniu, eĉ la plej pruda, ofendiĝas pro lia maldeca ago. Kaj pri Manneken-Pis la legendo rakontas:

Antaŭ multaj, multaj jaroj Brussel suferis sieĝon de potenca malamiko. Sed la Bruselanoj sin defendis kun ekzempla braveco. La sieĝantoj, post pluraj vanaj atakoj, decidis sin retiri sed, pro vengemo, intencis bruligi la urbon. Tiucele ili amasigis branĉofaskojn laŭlonge la urbaj remparoj. Post ekflamigo de meĉo, kiu devis konduki la fajron al la faskoj, la malamikoj forlasis la urban ĉirkaŭaĵon.

La Bruselanoj, kredante ke la malamiko lastmomente forlasis eĉ la intencon bruligi la urbon, ĝojebrie malsupreniris la remparojn kaj sin direktis al la granda placo por tie, en la gildodomoj, festi la venkon.

Malgranda knabo, vagante ĉe la remparoj, ĝustatempe rimarkis la danĝeron sed staris senhelpe ĉe la meĉo, ĝis kiam, subite, li havis la ideon urinante estingi la flamon, kiu jam ekminacis la faskojn. La dankemaj urbanoj, eksciante pri la heroo ago de la knabo, starigis simblan monumenton... Tiel rakontas la legendo.

Estis J. Duquesnoy, patro, kiu en la jaro 1619, konstruis la originalan statueton. Anglaj soldatoj forŝtelis ĝin en 1745, sed la Bruselanoj sukcesis reakiri la statueton el liaj manoj en Geeraardsbergen.

Du jarojn poste francaj infanterisoldatoj provis ŝtelakiri ĝin. La urbanoj tiom indigniĝis ke sangaj tumultoj ŝajnis neeviteblaj. Sed Ludoviko XV, reĝo de Francujo, intervenis kaj, dezirante forigi la malbonan impreson, donacis al Manneken-Pis luksan, orbrotitan kostumon.

La donacado de kostumoj al la eta nudulo — ĉu pro kompatato kun lia nudeco? — ekde tiam iĝis kvazaŭ kutimo kaj nuntempe li posedas vestaron tiom riĉan kiom varian. (La vestaĵoj de Manneken-Pis estas videblaj en la urba muzeo « Broodhuis », troviĝanta sur la granda placo).


En 1817 Manneken-Pis malaperis por la tria fojo. Post longedaŭraj esploroj oni finfine retrovis ĝin, tute rompiĝinta. Oni zorge kolektis la pecojn kaj farigis, laŭ tiu originala modelo, la bronzan statueton, kiu ankoraŭ nun ornamas la antikvan fontaneton.

Rerakontis : KETJE.

Internacia Mondekspozicio Brussel 1935

Pro sia grandioza mondekspozicio Brussel vekos, dum 1935, tutmondan intereson. Pli ol 30 landoj al ĝi partoprenos kaj sekve oni povas aserti, ke preskaŭ ĉiuj produktoj, de ĉiuj terpartoj estos ekspoziciataj.

La diversaj instalaĵoj necesigis terenon de 140 hektaroj, inter kiuj 17 por la parko. En la granda sportejo estas lokoj por 75.000 rigardantoj. Belaj florbedoj kun lumfontanoj kaj larĝaj aleoj apartigas la konstruaĵojn.



PAVILONO DE LA GRAFIKAJ ARTOJ

Arkitekto : Petit.


Krom la multaj rimarkindaj pavilonoj de la partoprenantaj landoj, estos ankaŭ vizitinda modela farmbieno en plena aktiveco. Tamen la plej admirindaj konstruaĵoj, sen ia dubo estos la grandaj palacoj konstruitaj en daŭraj materialoj.

De grandioza koncepto, tiuj palacoj estas veraj atestoj de la moderna — tamen modera — konstruarto. El ili la centra halo estas tutspeciale rimarkinda pro sia racia kaj aŭdaca koncepto. Ĝiaj dimensioj estas: alteco 31 m., larĝeco 87 m., kaj longeco 150 m. La arkaĵoj de tiu impona konstruaĵo transportas, sen kroma apogo, ĝian tutan larĝecon.

En unu el tiuj palacoj, speciale konstruita el nebruligebla materialo, estos lokitaj la standoj pri Malnova Arto. Ĉiu partoprenanta nacio tie havos propran standon por ekspozicii la plej tipajn verkojn de siaj famaj artistoj. Tamen pliampleksa estos la stando : Kvin Jarcentoj de Brusela Arto, kun verkoj de Roger van der Weijden, Pieter Breughel la maljuna, Bernard van Orley, David Teniers la juna, k. a.

Kiel ĉiu ekspozicio, la Brusela havos grandan parkon por amuzado kaj malnova Brussel, vera mezepoka urbeto, estos la ĉefa allogaĵo kie okazos ĉiuj folkloraj kaj historiaj festoj.

E. C.



LA BRITA PAVILONO

Arkitekto : White.



**Nun senprokraste
aliĝu !**

Leteroj el Esperantujo

VI.

Amiko la Koko,

Hodiaŭ mi komencas tie, kie mi finis mian lastan leteron. Temis pri la artikolo de S.ro P. Petit en « Franca Esp. ». Li konkludas ke por la unueco en la movado estas necese ke U. E. A. akceptu duan aŭ eĉ trian landan asocion el sama lando. Li montras, ke pro tio la du aŭ tri diversaj asocioj el sama lando estos devigataj je kunlaboro anstataŭ je kontraŭlaboro kaj kiel ekzemplo li skribas i. a. :

« La kunlaborado en K. R. (konstanta reprezentantaro) de la Ĉeĥa Asocio Esperantista kaj de la Germana Ligo en Ĉeĥoslovakujo preparis la enlandan kunlaboradon de la du asocioj kaj verŝajne ilian baldaŭan kuniĝon ».

Kvankam la diferenco inter la du asocioj en Ĉeĥoslovakujo havas alian karakteron ol la diferenco inter Belga kaj Flandra Ligoj, mi tamen opinias, ke la enirado en U.E.A. de Fl. L. Esp. progresigas kunlaboron kun B.L.E. en la estonteco, kio laŭ mi estas pli bone ol la nuna ambaŭflanka ignorado.

Laŭ S.ro Petit, U.E.A. bezonas nur ŝanĝi 2 artiklojn de siaj statutoj :

Art. 12, § 2. — Estas akceptata principe el unu regno nur unu asocio. Pri ĝia akcepto decidias la Komitato. Se dua aŭ tria asocio postulas la aliĝon, decido de la du trionoj de la Komitato estas necesa por la akcepto.

Art. 37, § 1. — Ĉiu landa asocio, kun 200 ĝis 1.000 regulaj membroj, elektas unu komitatanon kaj unu plian por ĉiu komencita milo. Validas ktp...

En la regnoj kie estas pluraj landaj asocioj, oni adicias la nombrojn de la membrojn de tiuj asocioj. La suma nombro fiksas la ciferon de la komitatanoj kiuj reprezentos la landon laŭ la supra §. Tiu nombro estas proporcie dividata inter la diversaj asocioj, kiuj elektas mem sia(j)n komitatano(j)n. Ĉiu asocio rajtas elekti unu komitatanon, se ĝi havas almenaŭ 200 membrojn. —

Se la ŝanĝo de tiuj 2 artikloj estus aprobata, tiam estus eble, ke en Belgujo « Fl. L. Esp. »; en Nederlando « Nederlanda Esperanto Gruparo »; en Germanujo « Nova Germana Ligo Esperantista »; en Hispanujo « Hispana Esperantista Konfederacio » kaj « Kataluna Esperantista Asocio » aliĝus al U.E.A.

Tio signifas por U.E.A. plifortigon per kelkmiloj da membroj. Kompreneble por ni la problemo ne estas solvita, ĉar post eventuala aliĝo restos ankoraŭ multe por solvi, ekzemple la rajton por nomi delegitojn k.t.p.

Por konkludi, mia (persona) opinio estas, ke U.E.A. por ni devas malfermi la pordon, kiun montris al ĝi S.ro Petit. La « Brusela Resolucio » estis la rezultato de la klopodoj de bonvolema angla samideano, sed la plej granda parto de la partianoj el ambaŭ kampoj jam de la komenco ne kredis sincere al ĝia realiĝo.

En Francujo mortis la San de januaro S.ro L. de Beaufront, unu el la ĉefaj pioniroj de Esperanto, en la aĝo de 80 jaroj.

Si ve posedas la « Krestomation », legu tiam la grandiozan paroladon, kiun li elparolis antaŭ multaj jaroj en Parizo.

Tiu parolado impresis min tiel, ke mi ĝin tradukis en mian gepatran lingvon. Tion mi faris dum la plej frua tempo de mia Esperantistiĝo. Poste mi legis, ke tiu ferfora pioniro kreis kaj propagandis alian helplingvon — Ido. Pro trio li detruis tion, kion li tiel pene konstruis: ĉiukaze la Ido-periodo estis por Esperanto, periodo neprogesa.

Mortis ankaŭ en Germanujo en la lastaj tagoj de februaro S.ro Arnold Behrendt, poŝtkonsilisto. Li estis Prezidanto de la 25a (jubilea) Universala Kongreso en Kolonjo. Post la fermo de la kongreso, sabaton posttagmeze, mi ĉeestis ekskurson per aŭtobusoj al « nekonata celo ». En la aŭtobuso mi sidis antaŭ du sinjoroj : F. Schoofs kaj A. Behrendt. De tempo al tempo ni intersanĝis kelkajn vortojn. Bone mi memoras ke ambaŭ samtempe min korektis, kiam mi parolis pri « germana raso », anstataŭ « ĝermana raso ». Post kelkaj momentoj mi ree volis diri ion sed mi rimarkis ke ili... dormis pro la lacigaj kongreslaboroj ! Nun ambaŭ jani estas mortintaj!

Estu kuraĝa !

R. LA VULPO.

Julius Karnas †

Nia tro frue mortinta Redaktoro naskiĝis en Berchem, apud Antwerpen, la 5an de februaro 1902. Dekokjara, li iĝis lerneja instruisto kaj eniris la Esp. movadon.

Membro de la Antverpena grupo « La Verda Stelo », li gvidis dum kelkaj jaroj kursojn, kune kun aliaj konataj membroj de tiu grupo, kiel F. Schoofs, M. de Ketelaere k. a. En la jaro 1923 mi konatiĝis kun li kaj min trafis lia bonhumora karaktero, lia bela kaj facila parolmaniero. Ne mirige, ĉar en li estis io poeta, kion li dum multaj jaroj montris. Li estis la samideano « de la flandraj kantoj esperantigitaj ». Multajn li majstre tradukis kaj la legantoj de Fl. Esp. multfoje povis ĝui, ne sole la tradukitajn, sed ankaŭ la originalajn poeziaĵojn de li. En 1930 li kompilis « Kantaro Esperantista », kiu rikoltis grandan sukceson inter la flandraj esperantistoj, kaj ankoraŭ nuntempe estas dezirata. En 1924 li kun diversaj aliaj gesamideanoj eliris el la grupo « La Verda Stelo » kaj helpis al la starigo de « Antverpena Poresperanto Propaganda Komitato ». Le ĉefa tasko de tiu komitato estis enkonduki Esp. en la lernejon. Komence la sukceso estis tre kontentiga, ĉar jam dum la vintro de tiu sama jaro ekfunkciis diversaj vesperaj kursoj en urbaj lernejoj, gvidataj de instruistoj profesiaj, posedantaj Esp. diplomon, kiu estis pagataj de la komunumo. Ankaŭ nia mortinta amiko gvidis tiajn kursojn. La novaj, tiel kreitaj Esperantistoj grandparte membriĝis al A. P. P. K. Ĉar A. P. P. K. fakte estis federacio de grupoj, ĝi tamen baldaŭ havis tiom da « individuaj » membroj, ke estis necese fondi novan grupon kaj tiamaniere la grupo « La Rekta Vojo » naskiĝis. De tiu grupo S.ro Karnas iĝis prezidanto, kiun funkcion li plenumis ĝis sia morto. Ni ne esploru tie ĉi la kaŭzojn de la dekadenco de L. R. V.; certe estas, ke la mortinto pri tio ne kulpas.



En 1926 li edziĝis al F.ino Irma Verhoeven, instruistino kaj samideanino. El tiu geedziĝo naskiĝis en 1928 fileto Hendrik, de post sia naskiĝo membro de L. R. V.

Dum tiu tempo la flandraj esperantistoj antaŭeniĝis. En 1929 aperis « Flandra Esperantisto » kaj jam en 1930 okazis la I-a kongreso de Fl. Esp. en Antwerpen. S.ro Karnas estis la prezidanto de tiu kongreso. De tiam la terura malsano, je kiu li mortis, ekkaptis lin. Li serĉis resaniĝon en la sanigaj arbaroj de « la Kempen », sed vane. En januaro 1933 li vojaĝis al Montana-Vermala, Svislando, kaj restis tie ĝis majo 1934. Belajn leterojn pri Svislando kaj poeziaĵojn li sendis al Fl. Esp. kaj al sia grupo. En la sama jaro li estis premiita de la « Internaciaj Floraj Ludoj » aranĝitaj de la « Kataluna Esperantista Federacio ».

Reveninte el Svisujo, li ĉeestis la ligkunvenon en Brusel en aŭgusto kaj prenis sur sin la taskon de Redaktoro de nia organo. Kiel kunlaboranto mi povis konstati kiel energie kaj optimisme li plenumis ĝin. Tamen, ne longe, ĉar jam en novembro li denove foriris Svislandon, antaŭe verkinte la ĉefan parton de la decembra kaj januara numeroj de Fl. Esp.

En malsanulejo en Lausanne, li ege suferis pro subita plimallboniĝo de sia malsano. La lastajn dek tagojn lia edzino estis ĉe li kaj ĉiutage klopodis malpezigi liajn dolorojn kaj konsoli lin. La 20an de februaro li mortis. Laŭ sia deziro li estas enterigita en sia naskiĝloko.

Li fosis sian sulkon kaj semis konstante... A. LODEMA.

Al la laste Ripozejo

Je la 8a matene de la 27a de februaro kolektiĝis multaj gesamideanoj antaŭ la domo de la formortinto. Ĉiuj laŭvice eniris por la lasta saluto kaj por esprimi kondolencojn al la parenkaro.

Ni rimarkis S.ron Deketelaere, ĉefdelegito por Belgujo de U. E. A.; S.ron L. Calloens, prezidanto de Flandra Ligo Esperantista, S.ron Van Stertegem, vic-prezidanto de la grupo « LA REKTA VOJO », kies prezidanto estis S.ro Karnas depost ĝia fondiĝo; S.rojn J. Jacobs kaj Bovoy, estraranoj de « Antverpena Poresperanto Propaganda Komitato; S.ron De Wagenaere, kunfondinto de « L. R. V. »; S.ron Genard, prezidanto de la « Flandrema Grupo Esperantista »; S.ron G. de Boes, prezidanto de « La Paca Stelo » el Ronse; S.ron J. Van Schoor, eksredaktoro de « Flandra Esperantista »; S.ron A. Lodema, tempe funkcia redaktoro de « Fl. Esp. » kaj multajn aliajn gesamideanojn.

Multaj bedaŭrinde ne sukcesis liberigi sin, inter kiuj S.ro H. Van Durme, redakcisekretario.

La standardoj de la « L.R.V. » kaj de « Fl. Gr. Esp. » provizitaj de funebra krepo, portitaj de S.roj A. Meire kaj G. Boigelot formis trairejon, tra kiu baldaŭ la ĉerko, kovrita de la Esp. flago pasos. Multaj belaj florkronoj estis alportataj: de « Flandra Ligo Esperantista »; de « La Rekta Vojo »; de « Flandrema Grupo Esperantista »; de « Antverpena Poresperanto Propaganda Komitato »; de « La Verdaj Pedalkavaliroj », kaj tinj de la parenkaro.

Je la 8.30a la malĝoja sekvantaro ekmoviĝis al la pregejo St. Rochus, dum sonoradis la sonoriloj.

... ..

Je la fino de la meso aŭdiĝis « La Espero » solene ludita de sam. ano Mertens, organisto.

Je la 10.15a la sekvantaro atingis la enterigejon de Berchem. Senbrue la tombistoj faris sian laboron; nur la singultplorado de la parencoj aŭdiĝis. Kiam la ĉerko estis sub la tersupraĵo, S.ro Calloens, prezidanto de F.L.E. parolis :

Nome de Flandra Ligo Esperantista mi deziras diri lastan adiaŭon al nia tiel frue forrabita ĉefredaktoro.

Kion mi diru ĉi tie antaŭ tiu malferma tombo, kiu baldaŭ estos terkovrita kaj fariĝos ĝis la lasta iago, la hejmo de nia altŝatata samideano Juul Karnas, la ĉiam bonhumora en la barbo ride-tanta amiko, la prudenta gvidanto, unu el la pioniroj de nia flandra movado esperantista, kiu kun la geamikoj de la unua horo vivtenis nian organon, nian ligan, malgraŭ la ofte terura batalo.

Li estis sperta lingvo-profesoro, li havigis al la flandroj interresplenan kanton, li estis prezidanto de nia unua kongresa komitato, li estis laboremulo, li antaŭ ĉio estis poeto kaj al ni ĉiuj havigis entuziasmon kaj kuraĝon por daŭrigi la laboron ofte tiel peniga.

Li por ni ĉiuj restos la optimista samideano, kiu malgraŭ korpaj suferoj, malpezigis al ni la taskon kaj montris al ni sekvindan ekzemplon.

Ni honoru lian memoron kaj daŭrigu lian laboron por la gloro de nia Flandrujo, kiun li tiel fervore amis, por la venko de Esperanto, al kiu li dediĉis siajn lastajn fortojn kiel ĉefredaktoro de Flandra Esperantisto.

Ni ne forgesu lian sindoneman edzinon, kiu tiel fervore subtenis lin, helpis lin, ilegis lin: ŝi akceptu la koran kunsenton de ni ĉiuj, kaj se konsolo povas esti por ŝi en tiu ĉi dolora momento, ke ŝi pripensu ke sia edzo preterpasis en la mondo, en Flandrujo, lasante spuron de altnivela animo, ŝi povas fieri pri lia vivo kaj ni ĉiuj ploras kun ŝi la bonan edzon, la koran amikon, la idealistan esperantiston, kiu certe ĝuos la rekompencan de sia admirinda karaktero, de sia nobla koro.

Ripozu en paco, amiko Juul, ni gardos ĉiam al vi lokon en nia koro.

Poste S.ro Lodema sin direktis al la parencoj kaj flandralingvedirigis kelkajn vortojn de konsolo. Li finis esperantlingve :

« Kara Juul, jam antaŭ 4 jaroj vi eksciis ke vi certe ne ĝisvivos la finan venkon de nia idealo. Sed malgraŭ tio vi daŭrigis vian laboron ; vi semis kaj semis konstante... Se ni Esperantistoj travivos momentojn de malespero, momentojn de granda dubo, momentojn de laciĝo, tiam ni pensu al vi, kiu ĉiam, ne rigardante malantaŭen, nek dekstren, nek maldekstren, sekvis la Rektan Vojon. Kara Juul, ripozu en paco en Flandra Tero ».

Malrapide ĉiuj forlasis kampon de la mortintoj...

A. L.

Esperanto kaj la Junularo

(FINO)

Plie ilia atento estis tro fiksata al nur unu idealo, tiel ke nun ili ne plu estas tiel kapablaj kompreni kaj varmigi por alia idealo. Por idealo oni ne gajnas personojn de ĉirkaŭ 20 jaroj; sed knabojn de 15, 16, 17 jaroj. Kompreneble oni ĉiam trovos kelkajn esceptojn, cetere la escepto konfirmas la ĝeneralan regulon.

Do granda tasko por gvidanto de junulara grupo estas: zorgi por plej diversa programo kaj eĉ tuta grupa vivo.

Kaj tamen en la nuna tempo ne multnombre venos la amatoroj. Kiaj novaj malhelpoj do staras antaŭ ni? Situacio kiu speciale la studentojn malhelpas, estas la fakto ke la programo de la mezaj ŝtatlernenoj kaj kolegioj estas tro ŝarĝata. La profesoroj ĉie proklamas ke oni devas iĝi personulo. Sed en la praktiko, per la tro multaj taskoj kaj materialo ili igas siajn studentojn malliberuloj.

Sed eble la plej grava kaŭzo estas la ĉion subpremananta krizo. Estas psikologia vereco ke oni ne bezonas paroli pri idealoj al homo kiu malsatas, kiu cerbumas kiel li morgaŭ gajnos sian panon. La sama stato ekzistas nun ĉe la junularo. Kiom da junuloj estas sen laboro? Ili do havas liberan tempon. Jes, sed kia libera tempo? Hejme ili aŭdas la plendojn de la familianoj. Sur strato ili devas serĉi laboron; kaj ĝin ne trovante ili volas distraĵon. Ankaŭ la studentoj. Kion faros la diplomitaj universitatanoj? Dum kelkaj jaroj ofte ili restas sen posteno; la advokato kaj kuracisto sen klientaro. Kiu finis ŝtatan mezlernejon aŭ kolegion : se ili restas hejme, la sama sorto

ilin atendas .Se ili iras al la universitato, la zorgo pri la pangajno estas prokrastita dum kvin jaroj... aŭ pli, se ili malsukcesas unu aŭ pli ekzamenojn. Sed poste?... Intertempe ili elspezas sumojn da ege bezonata mono.

Tia socia stato kripligas ĉiun kaj ĉian organizajon. Pro tiu stato ni rimarkis dum la lastaj jaroj ke en Flandrujo la movadoj kun nacieca tendenco malprogresis. Do, se tiaj movadoj suferas, kiel ne pli nia Esperanto movado suferus? Naciaj problemoj ja pli ol internaciaj kapablas varmigi la korojn.

Kaj ne estas ĉio. Flanke de tiuj tre gravaj malhelpoj venas ankoraŭ speciala faktoro kiu eble nur en Flandrujo ekzistas. Oni ne imagas kiel plezuriga, kiel koron plifortiganta ĝi estas. Ĝi vere plenumas ĉiujn leĝojn psikologiajn kaj pedagogiajn. Oni devas travivi tion, antaŭ ol oni komprenas.

Ekzistas Katolika studenta movado kiu antaŭ kelkaj jaroj estis tre forta. Bedaŭrinde ĝi tute ne plaĉis al la ĉefuloj. Kvankam ĝi formis aron da moralfortaj viroj, misionuloj k. t. p. tiuj ĉefuloj kontraŭbatalis ĝin per ĉiuj rimedoj. Anstataŭante la unuan movadon per alia, ili grandparte sukcesis. Kiel tio povas rilati al Esperanto? Tiel: se oni estas idealisto, iu, kiu volas fari ion belan kun sia vivo, tiam oni ĝenerale ne kontentigas kun unu nura idealo. Se tiuj studentoj batalis por Flandremaj celoj, ili faris tion por la bono de Flandrujo. Sed post iom da pripensado ili rimarkis ke Flandrujo ne nur bezonas proprajn institutojn, sed ke ĝi ekzemple ankaŭ bezonas purigon de malbonaĵoj kiel la alkohol- kaj tabak-kutimoj. Sekve de tio multaj iĝis tut-abstinenculoj. Kiam ili staris sur tiu alta starpunkto, ilia fervoro etendiĝis al ĉio, kio estas bona kaj bela. Se ili formus nun ankoraŭ fortan grupon, nun kiam jam estas kelkaj studentoj Esperantistoj, oni certe povus fari belan rikolton inter ili. Nia Flandra Ligo mem spertis ke ĝi obtenis plej kontentigajn rezultatojn en medioj kies ideoj pli, malpli similas al la ideoj de la supre menciita studenta movado. Sed la ĉefuloj disvastigis movadon kiu celas fortiri la junulojn el ĉio kaj en ĉiuj aferoj komplete submeti ilin al si kaj al aliaj mastroj kun kiuj ili agrable kompromisas. La rezultatoj : Aroj da studentoj en tiu movado ne pro entuziasmo, sed pro sistema devigo. Aliaj, kiuj tute ne plu klare vidas kaj kiuj aliĝas ĉar ili sentas ke ili tamen ie devas eksterigi siajn junajn sentojn. Generale — kaj ĉi-tie mi miksas la du kaŭzojn : krizo kaj interbatalado de du idealistaj movadoj — ĝenerale ĉe la nunaj studentoj: ega malkresko de la idealismo kaj oferemo. Oni konsternigas kiam oni rigardas al la hodiaŭa studanta junularo; kiel la oferemo tute foriras! Kiaj skeptikuloj ili iĝas! Por neniu idealo utilas alparoli ilin. Preskaŭ en ĉiu klaso estas grupeto da tiaj maljunaj knaboj, kiuj revas pri bona glaso da biero kaj pri belaj vestaĵoj. Kaj ili venenigas la tutan klason. La — cetere multaj — duonbonuloj kaj la kelkaj boneguloj, kiuj eliras la kolegion, ne longe povas konservi sian sintenadon je la multaj problemoj, kiujn ili ne povas solvi pro la antaŭa ne sufiĉa aŭ malvera eduko.

Vi bone komprenu ke mi ne sole kulpigas tiun kontraŭmovadon, eĉ mi ne pensas ke ĝi estas la plej grava kulpulo, sed ĝi en tiu senco faris multe da malbono. Kio do povas resti? Nur malmulte. Kelkaj

en ĉiu urbo, kiuj celas ĉie venkigi la bonon, kiuj staras en multaj movadoj, se ili estas nur boncelaj. Ili akceptas la pezegan luktadon. Ĉio antaŭdiros ke ili estas la lastaj restantoj de formortanta idealista generacio. Post ili verŝajne venos generacioj tre malaltaj, sen ia idealo; junaj maljunuloj; junuloj kiuj perdis la esencon de la juneco. Ĝis tiam denove ondo de idealismo superfluos estontan generacion. Ĝis forta reago subakvigos la tutan dikkan kottavolon de materialeco. Reago kiu certe venos, ĉar jam neniam ekzistis ago sen kontraŭago. Vere, mi estas tre pesimista, sed ne malprave. La estonteco ne aspektas rozkolora, sur nenia kampo de la homa vivo nuntempa; ankaŭ ne sur la kampo kiun mi priskribis.

Ni atendu la tempon dum kiu denove idealismo aperos. Ni esperu ke ĝi pli frue alvenos ol ni atendas kaj precipe ke sufiĉe da junaj Esperanto-kernoj estas pretaj por ĉie disvastigi nian lingvon en la junulaj rangoj.

R.

NOTO DE LA PREZIDANTO : Mi tralegis kun interesiĝo la ĉi-supran artikolon, kiun ni lasis en ĝia junuleca, prasimpla vestaĵo ĉar la ideoj en ĝi — kvankam ne ĉiuj aprobitaj de ni — atestas ja seriozan enpensigon de la aŭtoro, kvankam ankaŭ de iom da troa persona eĥado de propraj suferoj kaj kontraŭagado.

Mi, laŭ mia ofico de prezidanto devas esti optimisto, mi ĝin estas ankaŭ laŭnature, kaj do ne aprobas la malhelan bildon, kiun por ni pentras nia junular-amiko. Mi scias ke en nia kara Flandrujo la junularo estas unu el la plej sociaj; mi certe ankaŭ scias ke gvidantoj provas centri ĝiajn fortojn al unu punkto plej utila al ia politika aŭ socia celo. Sed ni ĝuste utiligu nian movadon ankaŭ por tiuj celoj, se ili sekvas la saman vojon al nia esperanta idealo; ni tion diru kaj vidigu al tiuj gvidantoj, ke ili nenion perdos; male plifortigos sian movadon per Esperanto speciale laŭ la internacia vidpunkto: ni instigu ilin rigardi trans la muron de nia eta lando, ni diru al ili ke gefratoj loĝas trans la landlimo, kiuj havas samajn zorgojn, samajn celojn, samajn idealojn. Nur la fanatikuloj kaj la neinduloj rifuzos finfine aŭskulti nin.

ĈIU BONA HOMA FORTO, ESTAS, LAŬ MI, SE BONE ADAPTITA, UZEBLA POR LA IDEALO, KIUN NI DANKAS AL DOKTORO ZAMENHOF, LA OPTIMISTA.

VIA OPTIMISTA PREZIDANTO.

Ekzamenoj

En AALST. — Le 14an de aprilo okazos ekzamenoj en Aalst je la 9.30a en la lernejo Nieuwbeekstraat.

En BRUGGE. — La 28an de aprilo estos la vico al Brugge, Tie ili okazos en Middenstandshuis, Garenmarkt, je la 9.30a.

En ambaŭ lokoj ni atendas samideanojn el aliaj urboj. Partoprenantoj pagu 10 fr. al P. C. 3268.51 de F. E. I. Kortrijk. Sciigoj pri ekzamenoj estas ĉiam haveblaj ĉe F.ino J. Terrijn, Raapstraat, 82, Gent.

De Letterkundigen en het Esperanto

Enkele jaren geleden hield de voorzitter van de Hongaarsche Esperantovereeniging, de Hr Karinthy, op het P. E. N. congres te Budapest, een pleidooi voor het Esperanto en verzocht hij om de beschermende sympathie van de P. E. N. club.

Op het laatste P. E. N. congres te Edinburg, werd de wensch aangenomen « tot oprichting van een internationaal tijdschrift in het Fransch, het Duitsch en het Engelsch ten behoeve van de literaturen, die niet tot voornoemde groote taalgebieden behooren. Wat weten wij (vraagt de Vlaamsche letterkundige M. Roelants, aan wiens verslag wij deze regels ontleenen) van de Baltische, de Zuid-Amerikaansche, de Balkanliteraturen? Wat weet men in de wereld van onze literatuur? Wederzijdsche kennis te bevorderen is P. E. N. werk, dat velen ter vergadering sympathiek voorkwam. De uitwerking van het tijdschrift werd aan de Vlamingen opgedragen. Groot plan in de lucht? Kasteel in Spanje?... »

Een internationaal tijdschrift in het Fransch, het Duitsch en het Engelsch...

Wij Esperantisten kunnen met voldoening wijzen op de uitstekende diensten die het Esperanto sinds jaar en dag bewijst aan de literaturen der kleinere taalgebieden en de hoop uitdrukken, dat de letterkundigen eenmaal tot een juister besef mogen komen van de waarde van *de internationale taal* op dit gebied. T.

Inter Ni

BRUSSEL. — N. E. L. E. — Sur la programo de la grupo staras, dum la monato marto, jenaj interesaj punktoj : en « Hof van Tilmont », Lakenstraat, la 7-an de marto, je la 20 1/2 nia prezidanto, J. Vandendooren, parolos pri Esp.

En nia ejo « Breughel », la 12-an de marto, je la 20-a parolado de S-ro Robert pri Radio kaj la 26-an de marto, je la 20-a parolado de nia ano Loeckx pri: La historio de Alseberg (kun lumbildo).

FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA. ANTWERPEN.

La 28an de februaro post la fino de la tagordo, nia ano S-ro Van As prelegis memredakditan artikolon, aperinta en « Heroldo de Esperanto ». La artikolo estis tre bona kaj pruvis ke S-ro Van As estas bona humorgeniuolo. La 3an de marto ni vizitis la ventoladejon de la tunelo por veturiloj; estas tre interesa konstruaĵo, en kiu ni povis sekvi ĉiun agadon, kiu okazis en la tunelo.

La 9an okazis nia karnavala balo en la festsalono « In de Ton », Pelikaanstraat. Komence ni dubis pri la sukceso de nia balo, ĉar je la 21a nur proksimume dudek personoj ĉeestis, sed laŭ laŭdinda (?) Antverpena kutimo, la grandaj gesinjoroj venis iomete pli malfrue. La balo iĝis vera sukceso, dank' al la penado de nia festdirektoro kaj al nia bonega jasbando, sed bedaŭrinde sonis tro frue la dua horo kaj nur kontraŭvole la gedancantoj reiris hejmen.

La 13an de marto nia amiko C. Schroeyers faris interesan kaj lernigan paroladon pri la pronomoj lia, ŝia kaj sia. Tiu ĉi parolado servis samtempe kiel perfektiga kurso kaj ĝi pruvis ke tiuj ĉi pronomoj kaŭzas la plej grandajn malfacilaĵojn al la ekzercantoj de nia lingvo.

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA **(Vlaamsche Esperantisten - Bond)**

Voorzitter: Leo Calloens, Erembodegemstraat, 29, Aalst.
Ondervoorzitter: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.
Sekretaris: Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.
Penningmeester: Bernard Bassleer, St. Rochuslaan, 93, Kortrijk.
Propaganda: Gerard Lenaers, Willemstraat, Hamme.
Postcheck: Flandra Ligo Esperantista, Kortrijk, nr. 2321.50.
Orgaan: « Flandra Esperantista », maandblad.
Lidmaatschap (met maandblad): 20 fr. per jaar.

Aangesloten groepen:

Aalst: « Pioniro », lokaal: « De Koornbloem », Grootte Markt; vergaderingen elke Woensdag avond.
Aarschot: « La Progreso », lokaal « Vlaamsch Huis », Deertschestraat; vergaderingen elken Zaterdag avond.
Antwerpen: « Flandrema Grupo Esperantista », lokaal « De Nieuwe Carnot », Carnotstraat, 10, vergaderingen elken Woensdag avond.
« La Rekta Vojo »; lokaal « De Gulden Kroon », St. Jacobsmarkt, 98; vergaderingen Donderdags om de 14 dagen.
Brugge: « Katolika Junulara Esperanto Grupo », Oude Gentweg, 3.
Brussel: « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.); lokaal « Breughel », Em. Jacquemainlaan, 37; vergaderingen elke Dinsdag avond.
Edegem: « Nia Idealo », Hovestraat, 130.
Hamme: « Juna Flandrujo »; lokaal « Jong Vlaanderen », Kapelstraat, 5; vergaderingen elke Woensdag avond.
Kortrijk: « Esperantista Grupo »; lokaal « In den Tuin », IJzerweglaan, 5; vergaderingen elke Woensdag avond.
Lede: « La Esperanta Stelo »; sekretariaat: Krommenellenboog, 60. Lede.
Leuven: « Nova Tagiĝo »; sekretariaat: Tienschestraat, 106.
Lichterfelde: Sekretariaat, Weststraat, 47.
Mechelen: « La Estonto », lokaal: Bovenzaal der stedelijke Bibliotheek, Wollemarkt; vergadering elke Vrijdag te 20 uur. — Briefwisseling: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54.
Nieuwpoort: « Esperantista Grupo »; sekretariaat: Langestraat, 6.
Oostende: « Esperantista Grupo »; sekretariaat: Lijndraaiersstraat, 48.
Oudenaarde: « Al Paco »; sekretariaat: Wijngaardstraat, 17.
Roeselare: « Ruselara Grupo Esperantista »; Statedreef, 177.
St. Niklaas: « Al Triumfo »; sekretariaat: Wegvoeringstraat, 73.

Alle inlichtingen verstrekken verder te:

Diksmuide: M. Maekelberg, Wilgenwijk, 28.
Gent: Juliette Terrijn, Raapstraat, 82.
Harelbeke: A. Doornaert, Stacegemstraat.
Hoboken: J. de Groot Caronstraat, 31.
Maria-Hoorebeke: Gerard Broodcoorens, Dorp.
Meenen: K. Depypere, Kortrijkstraat, 160.
Millen (Tongeren): L. Geukens, Langstraat.
Mortsel: H. Van Durme, Eggestraat, 21.
Ronse: « La Paca Stelo », lokaal « Concordia », Statiestraat.
Thielt: R. Plettinck, Kromwalstraat, 24-c.

OSTENDO

HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

ESPERANTISTOJ!!!

La

KANTARO ESPERANTISTA

Kompilita de Juul Karnas

enhavas 111 kantojn,
estas 112 paĝa,
enhavas ion por ĉies gusto,
enhavas la plej belajn verkojn el la
popolkantoj de ĉiuj nacioj,
estas bele eldonita,
kaj ... kostas nur 6 frankojn!

Mendu ĝin tuj ĉe
H. v. d. Mast. poŝtkonto : 209.852.
Tweelingstraat, 6, Antwerpen.

« BREUGHEL »

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacqmainlaan, 37, Brussel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj
malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)

Kien iri je Pentekosto 1935? (8 - 10 Junio
Al la
6^A Flandra Kongreso de Esperanto en Brussel

300 Bildojn Kaj 1100 Titolvortojn

en densega komposto prezentas al vi la

UNUA VOLUMO DE

ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO

sur 272 teksto- kaj 112 bildopaĝoj, formato 15×23. La dua volumo ampleksos
proks. 540 paĝojn.

(Eldono de Literatura Mondo kaj Asocio de Esperantistoj Libro-Amikoj
Budapest).

Ĝi pritraktas per metodoj de scienca laboro la tutan movadon ekde la
naskiĝo ĝis la plej lastaj tempoj. Detala historio. Proks. 2000 biografioj. Indiko
de libroj, ktp.

Prezo de la du volumoj (la unua sendota tuj post pago): broŝurite 30 fr.
svis., bindite: 34 fr. sviz. Aldonu 10 % por sendkostoj.

Ekzistas ankaŭ eldono sen ilustraĵoj. Prezo de ambaŭ volumoj, nur bro-
ŝurite: 18 fr. sviz. plus 10 % por sendkostoj.

Mendantoj de tri ekzempleroj ricevas unu senpagan.

Havebla ĉe Flandra Esperanto-Instituto. (Poŝtkonto n^o 326.851)

« Presejo de l' Centro », Kipdorpest, 26, Antwerpen.